# Voĉo el Bona Espero

| FAZENDA-ESCOLA BONA ESPERO<br>Instituição Educacional Esperantista<br>CNPJ 01.393.339/0001-68 | Alto Paraíso de Goiás<br>Caixa Postal 037<br>CEP 73.770-000 BRASIL<br>Tel. 55 62 3446 11 75<br>bonaespero.brasil@gmail.com |
|---|---|

Alto Paraíso de Goiás, Bona Espero, 20ª julio 2018

**INFORMO PRI LA NUNAJ AKTIVECOJ DE BONA ESPERO**

La Bieno-lernejo Bona Espero festis siajn 60 jarojn da socia kaj eduka agado dum tuta semajno kun la partopreno de multaj ekslernantoj, helpantoj, volontuloj, bonfarantoj, esperantistoj kaj lokaj aŭtoritatoj.

La Parlamento de nia ŝtato Goiás honoris la Institucion dum granda solenaĵo per Diplomo pro Longjara Servo al la familioj en la kampara regiono. Temis pri iniciato de Deputito Santana Gomes, adoleskanto dum pluraj jaroj en Bona Espero.

LaGubernestro de Goias, Marconi Perillo, dankis al Bona Espero per mesaĝo, agnoskante nian sukcesan laboron favore al la socia evoluo de Chapada dos Veadeiros.

La aktivecoj de Bona Espero ne plu inkludas alfabetigon kaj protekton de infanoj kiel dum 60 jaroj, sed novaj programoj okazas daŭre en la kampo de edukado kunlabore kun Unio Planeda kaj la Universitato de Brasília. La direktoro de UnB Cerrado kaj de la Fakultatoj de Turismo kaj Ekologio, sendas periode por sciencaj esploroj, siajn studentojn de ekologio, biologio kaj ekoturismo por studkampoj en niaj prezervitaj savanaj grundoj, riĉaj je multaj specioj de fauno kaj floro. Majstriga kurso pri Ekopsikologio okazas dum la venontaj tri jaroj.

Kontrakto estas celebrita inter la Ŝtata Departemento de Edukado, Kulturo kaj Sporto por ke Bona Espero gastigu la Instituton por Esplorado de Arto en Edukado (IPEARTE) en niaj urba kaj kampara sidejoj.

Muzeo "Casa da Memória de Bona Espero", kreita de iamaj lernantoj, estas konservata kaj administrata kiel majstriga tezo en Pedagogio kaj je dispono de studentoj kaj vizitantoj, esperantistoj, turistoj kaj ĵurnalistoj. La Universitato de Goiás eldonis libron pri tiu internlanda esperantista eduka aktiveco pro la eksterordinara graveco de paca kaj respektema kunekzistado de diversaj kulturoj en la ĉiutaga kunvivado de infanoj kaj eksterlandaj volontuloj, kiuj edukis kaj alfabetigis la infanojn. En la libro oni legas, ke:

"Bona Espero estas la konkretigo de revoj de grupo de brazilaj esperantistoj, samtempe kun la konstruado de la nova ĉefurbo Brasília. Ili alvenis de Nordoriento en 1957 por aktive kunlabori por ke Brazilo povu elradii ekzemplon de mondo kun

plurkultura harmonia kunvivado kaj ĉiam konektita al la belecoj kaj riĉecoj de la naturo, servante la lokan socion. Esperanto ĉiam estis kaj restas la ĉiutaga lingvo.

Bona Espero estis iaspeca ekologia vilaĝo, kie homoj el diversaj partoj de la mondo, vivas en solidareco por protekti la medion, uzas komunan lingvon, kreas daŭrigeblan memsufiĉon plantante fruktarbojn kaj nutraĵojn ĉiuspecajn kaj realigante edukajn kaj aliajn aktivecojn laŭ ekologiaj konceptoj. Sed ili ne vivas izolitaj de la loka socio, sed integriĝas harmonie kun respekto kaj konkreta propono - alfabetigi, protekti, eduki infanojn de kamparaj familioj sen aliru al lernejoj. Tiutempe ne ekzistis en la regiono tagĵurnaloj, nek radio aŭ televido, nek elektra energio kaj vojoj, kaj preskaŭ perdiĝis la memoro pri tiuj jardekoj, sed nun iamaj lernantoj estas tiel konsciaj per siaj akademiaj studoj, por protekti tiun pecon de loka kulturo – Bona Espero.

Spontanee formiĝis Klubo de ekslernantoj kiuj havas, tra la novaj teknologioj de komunikado, daŭrajn kontaktojn kaj renkontojn. Tiu kunvivado estis kaj restas la naskiĝejo de riĉa internacia kultura miksiĝo inter infanoj, adoleskantoj kaj volontulaj esperantistoj el dekoj da landoj de la mondo, ofertante sian kunlaboradon dum jardekoj.

La kunvivado kreis novan pensmanieron, novan mondvidon kaj komprenon, per ekzemploj de respektema toleremo de la kultura pluralismo, eĉ en la manĝkutimoj.

Kaj Esperanto estis la instrumento por akceptigi la kulturajn fremdaĵojn de la kunestado kun plej malsamaj kulturoj. Tiu kunvivado kun diversaj kulturoj vekis scivolemon en la infanoj, kiuj hodiaŭ en sia profesia kaj familia vivo, certe profitas el tiu infana sperto. Konservi ĉi tiun lokan kiel kulturan heredaĵon certe havas sian valoron por la loĝantaro de la agrikultura internlando de Goiás ".Tiel atestas la ekslernantino Amanda Ferreira Torres en siaj universitaj pedagogiaj studoj.

Fazenda-Escola Bona Espero bonaespero.brasil@gmail.com




Informiloj en la muzeo de Bona Espero